



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2024 (230)

13. 6. 2024

2024 – la jaro de la ĉeĥa muziko



Bildo: J. Matthauser (1913)

La jaro 2024 estas rememoriga por la ĉeĥa muzik-kulturo. Oni omaĝas kelkajn komponistojn, al kiuj koncernas la „magia numero 4“, ĉefe jenajn: Bedřich Smetana (1824–1884), Antonín Dvořák (1841–1904), Leoš Janáček (1854–1928). Pere de la artikolo 2024 – *la jaro de la ĉeĥa muziko* de Margit Turková ni elstarigu la geniulon Bedřich Smetana (*vidu la paĝojn 9–12*).

EL LA ENHAVO

La lastaj 10 jaroj en retrospektivo	3
E-mental' en Graz (V. Pištíková)	4
Diskuto kun Martin Petiška	6
Klimata vortareto	8
La jaro de la ĉeĥa muziko (M. Turková)	9
Niaj poetoj centjariĝis (M. Turková)	14
Kavaliroj el Blaník (A. Jirásek)	20

O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík

AKTUALAĴOJ

Okazintaĵoj

04/01/2024 – Jiří Altior projekciis videojn el koncertoj, kiuj okazis dum la Jubileo de 90 jaroj de Esperanto en Svitavy en septembro 2023 (*kunvenejo*)

18/01/2024 – prelego de Tomáš Břicháček pri la historio kaj nuntempo de la praga Bulteno (*kunvenejo*)

26–28/01/2024 – festo „25 jaroj de E-mental’“ en Velké Pavlovce

01/02/2024 – la unua parto de prelego de Margit Turková pri spiritismo (*kunvenejo*)

15/02/2024 – la dua parto de prelego de Margit Turková pri spiritismo (*kunvenejo*)

25/02/2024 – tradicia E-mentala aranĝo Bestĝardeno

02/03/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN1 en Brno

14/03/2024 – prelego de Margit Turková nomita „Omaĝe al nia Lingvo Amuzige – Amuzeme – Amuzcele“ (*kunvenejo*)

15–17/03/2024 – E-mentala ekskurso al Graz

22/03/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 2 en Pardubice

28/03/2024 – prelego de Margit Turková nomita „2024 – la jaro de la ĉeĥa muziko“; festo de Verda ĵaudo kun verda biero

11/04/2024 – prelego de Tomáš Břicháček nomita „La lastaj 10 jaroj de nia klubo en retrospektivo“ (*kunvenejo*)

13/04/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 3 en Ostrava

19–21/04/2024 – E-mentala aranĝo 19-a BIERo en Břeclav

25/04/2024 – prelego de Pavla Dvořáková pri esperantistoj-muzikistoj / muzika vespero (*kunvenejo*)

01–20/05/2024 – E-mental’ partoprenis Virtualan kuron por Paraple

23/05/2024 – diskuto kun la verkisto Martin Petiška kaj publika lanĉo de Esperantaj tradukoj de du libroj de lia patro Eduard Petiška: *Malnovgrekaj mitoj kaj legendoj* kaj *Golemo kaj aliaj judaj mitoj de la malnova Prago*

25/05/2024 – E-mental’ partoprenis Kuron por Paraple

06/06/2024 – prezentado de Vlasta Piščíková pri Kalabrio (*kunvenejo*)

08/06/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 4 en Česká Třebová

La lastaj 10 jaroj de nia klubo en retrospektivo

La 11-an de aprilo 2024 okaze de la 10-a datreveno de la nuna estraro (kiu kun nemultaj ŝanĝoj funkcias ekde februaro 2014) Tomáš Břicháček resumis en sia prelego la lastajn 10 jarojn de nia klubo. La kunvenon partoprenis ankaŭ kvar eksterlandaj gegastoj.



Polyglot Gathering

Ekde la 15-a ĝis la 19-a de majo 2024 okazis en Prago aranĝo Polyglot Gathering. Partoprenis pli ol 750 homoj el sep dekoj da landoj.

PG estas la plej granda internacia evento por poliglotoj (plurlingvuloj) kaj lingvemuloj, organizata ĉiujare en majo. Ĝi estas plena de prelegoj, riĉaj kulturaj prezentoj kaj amuza socia programo.

Dum la aranĝo la partoprenantoj kundividas sian amon kaj plenumas sian pasion pri kulturoj kaj lingvoj, interŝanĝas konsilojn kaj spertojn, kaj, plej grave, uzas kaj ekzercas multajn lingvojn por diskuti, aŭskulti, lerni kaj amikumi. Polyglot Gathering taŭgas por lernantoj, instruistoj, ŝatantoj, komencantoj, profesiuloj, sciencistoj, edukistoj.

La ĉeforganizanto estas E@I, kies kunordiganto estas Peter Baláž el Slovakio.

E-mental' en Graz

Vlasta Pištíková

Dek membroj de la klubo E-mental' forveturis la 15-an de marto 2024 per trajno el Prago al Graz en Aŭstrio por travivi semajnfino kun lokaj esperantistoj.

La evento estis planita jam kelke da monatoj kaj grazanoj dume diligente preparadis programon. Ĉar E-mentalanoj estis informitaj pri la planoj, ĉiuj tre ĝojatendis la kunvenon. Sed ĉiuj imagoj pri la renkontiĝo estis superigitaj. La programo estis perfekte preparita de la komenco ĝis la fino kaj partoprenantoj vere povis ĝui ĉiujn programerojn.

Jam alveno en la ĉefstacidomon en Graz estis eminenta. Lokuloj estis venantaj kun kluba flago, dum la grupo de E-mentalanoj iris de la dua flanko kun Esperanto-flago.

Jam tio ĝojigis ĉiujn kaj tuj posta rapida reciproka interkonatiĝado estis tre gaja.

Post komuna fotado sur perono estis E-mentalanoj portitaj per aŭtomobiloj al Esperanto-monumento kaj post plua fotado plue al loĝloko, kiun kiel unusolan aferon de la semajnfino E-mentalanoj mem prizorgis.

Post la loĝigo ĉiuj kunvenis en saloneto de nemalproksima restoracio por vespermanĝi kaj interkonatiĝi.

E-mentalanoj pere de simpla ludeto transdonis al unuopaj grazanoj donacetojn. Poste jam estis tempo por foriri al pensiono kaj iri dormi.

Sabate matene E-mentalanoj estis aŭte portitaj al klubejo, kiun grazanoj antaŭnelonge akiris dank' al urbestriino. Post la trarigardo de vere tre bela klubejo ĉiuj kune promenis ĝis la urbocentro, kie en surtegmenta kafejo estis mendita tablo. Post trarigardo de la urbo el la tegmento ĉiuj kafumis aŭ teumis, lokuloj parolis kun ĵurnalistoj.

De la kafejo oni iris al Kastela monto super la urbo, kie oni vidis Horloĝan turon, kastelon, vizitis muzeon, ĝuis rigardon al la urbo kaj dum la tuta tempo ricevadis multe da interesaj informoj de la lokuloj...

Post reveno el la monto oni vizitis urban turisman informojon, kie oni povas dank' al lokaj esperantistoj ankaŭ trovi broŝuron pri la urbo en Esperanto.

Ĉiuj ĝuis poste ripozon dum la tagmanĝo en proksima restoracio, kie estis mendita tablo. Post la manĝo estis iom da tempo, por ke E-mentalanoj havu eblon aĉeti iujn donacetojn por proksimuloj hejme kaj tuj poste estis promeno tra interesa artefarita insulo meze de la rivero.

Je la sepa horo oni vespermanĝis en restoracio kaj poste oni ludis bilardon. Kvankam preskaŭ ĉiuj E-mentalanoj ne scipovis ludi la ludon, ĉiuj plene ĝuis ĝin. Post la ludo ĉiuj lacegaj E-mentalanoj volonte revenis en la pensionon.

Matene estis E-mentalanoj portitaj per aŭtomobiloj al proksima vilaĝo Thal, kie oni unue vizitis interese rekonstruitan preĝejon kaj poste domon, kie naskiĝis Arnold Schwarzenegger kaj kie nuntempe estas muzeo pri li. De la muzeo oni jam rapidis al restoracio por tagmanĝo, ĉar trajno de E-mentalanoj reen al Ĉeĥio veturis duonhoron post la tagmezo.

Adiaŭo kun ĉiuj grazanoj estis tre kortuŝa. E-mentalanoj invitis grazanojn al Prago kaj grazanoj promesis baldaŭ veni.

La tuta semajnfino estis vere bonega. Grazanoj sukcesis perfekte ĉion plani, ĉiam ili estis helpemaj, komune ili diskutis kaj pri seriozaj kaj pri malseriozaj temoj.

Nekredebla estis ilia sukceso ricevi subvencion de la urba registaro kaj dank' al tio E-mentalanoj havis ekzemple senpagan tagmanĝon kaj vespermanĝon.

Ĉiuj bedaŭris, ke la semajnfino estas nur tiom mallonga – volonte ĉiuj E-mentalanoj restus pli longe.



Nova Honora membro de E-mental'

E-mental' havas jam la duan Honoran membron! La titolon transprenis okaze de la 70-a naskiĝtago Miroslav Malovec, kiu estas eminenta esperantisto, kiu dediĉis sian vivon al Esperanto.

Diskuto kun Martin Petiška



La 23-an de majo vizitis nian klubon la verkisto Martin Petiška, filo de Eduard Petiška. La kunvenejo estis plenplena. Pavla Dvořáková preparis interesan kulturalan programon pri ambaŭ verkistoj.

Sinjoro Petiška afable kaj alloge parolis. Poste okazis publika lanĉo de Esperantaj tradukoj de du libroj de Eduard Petiška: *Malnovgrekaj mitoj kaj legendoj* kaj *Golemo kaj aliaj judaj mitoj de la malnova Prago*.

Koncerne la duan libron vidu la sekvantan paĝon.

Novaj prelegoj en nia jutuba kanalo

Tomáš Břicháček: *Historio kaj nuntempo de la praga Bulteno*


<https://www.youtube.com/watch?v=7qCt9Y0emGU>

Tomáš Břicháček: *La lastaj 10 jaroj de nia klubo en retrospektivo*

<https://www.youtube.com/watch?v=btP91BAHjjw>

Ni rekomendas ankaŭ la jutuban kanalon de niaj brnaj gesamideanoj <https://www.youtube.com/@esperantobrna>, kie aperas ĉiam novaj kaj novaj interesaj prelegoj kaj aliaj videoj.

Nova publikaĵo de KAVA-PECH: Golemo kaj aliaj judaj mitoj de la malnova Prago



Aŭtoro: Eduard Petiška

Tradukis Vladimír Türk

Ilustris Miroslava Tomečková

ISBN 978-80-88326-49-6

159 paĝoj, kolore ilustrita, solide bindita

140 x 200 mm

Verkisto kaj tradukisto Eduard Petiška (14. 5. 1924 – 6. 6. 1987) estas aŭtoro de pli ol naŭdek libroj, alparolanta jam la kvinan generacion, de legantoj infanaĝaj ĝis la supozeble saĝa maljuneco. Ĉiuj konas la libron „Martínkova ĉitanka“, aŭ la figureton Krteček (Talpo), kiu, kiel maskoto de la astronauto Andrew Feustel, ankaŭ vizitis la kosmon en 2011. Liaj libroj estis tradukitaj en kelkdek lingvojn kaj populariĝis eksterlande.

La libro Golemo proksimigas al la leganto la mondon de la praga juda urboparto ekde ĝia komenco – la alveno de la unuaj judoj, laŭ legendo, dum la regado de la princo Hostivít, la duonmita patro de la unua kristana Přemysl-ido Bořivoj – ĝis la tempo de la imperiestrino Maria Tereza. La ĉefa heroo de unu parto de la libro estas la fama praga juda rabeno Jehuda ben Becalel, la kreinto de la ne malpli fama golemo.

La libro Golemo, eldonita unuafoje en Esperanto, nun parolas plian lingvon, same kiel ĝi jam alparolis la legantojn en la angla, germana, franca, rusa, itala, estona...

Klimata vortareto

adaptiĝi	přizpůsobit se
adaptiĝo	přizpůsobení se
aktivulo	aktivista
alarmisto	alarmista
cirkla ekonomio	oběhové hospodářství
daŭripova evoluo	udržitelný rozvoj
daŭripovo	udržitelnost
emisio	emise
eksplozomotoro	spalovací motor
elektra aŭtomobilo	elektromobil
Eŭropa Verda Pakto	European Green Deal, Zelený úděl pro Evropu, Zelená dohoda pro Evropu
forceja efiko	skleníkový efekt
forcejaj gasoj	skleníkové plyny
hidrogeno	vodík
homfarita	lidmi vytvořený, lidmi způsobený
karbona dioksido	oxid uhličitý
karbona spuro	uhlíková stopa
klimata alarmismo	klimatický alarmismus
klimata ĉagreno	klimatický žal
klimata neŭtraleco	klimatická neutralita
klimata skeptikismo	klimatický skepticismus
klimata ŝanĝ(iĝ)o	změna klimatu
klimato	klima
klimatologio	klimatologie
kvazaŭreligio	kvazináboženství
longperspektiva temperaturcelo	dlouhodobý teplotní cíl
mildigo	mitigace, zmírňování
nulecaj netaj emisioj	nulové čisté emise
paniki	panikařit
Pariza Interkonsento	Pařížská dohoda
renoviĝanta energio	obnovitelná energie
skeptikulo	skeptik
tutmonda varmiĝo	globální oteplování

2024 – la jaro de la ĉeĥa muziko

Margit Turková

Kial ni solenas ĝin ĝuste en tiu ĉi jaro? Ĉu tial, ke al la dato, kiu finiĝas per la „4“ ligiĝas viv-datoj (ĉu koncerne naskiĝon, ĉu morton) de kelkaj ĉeĥaj muzikistoj? Jes, sed ĉefe tial, ke per la **1824** (2. 3.) kaj **1884** (12. 5.) estas limita la vivo de **Bedřich Smetana**, la unua komponisto, kiu povas esti nomita *Kreinto de la ĉeĥa (nacia) muziko*.



La *persona* signifo de Bedřich Smetana estas en tio, ke li sieĝis ĉiujn malfavorojn kaj malgrandecojn (Zdeněk Nejedlý, 1962). La *muzik-signifo* estas en lia batalo pri moderna ĉeĥa muziko (Otakar Hostinský, 1900).

(*Rim..: En la eldiro troviĝas informo, ke jam en 1924 estis omaĝita la evento sub la sama nomo kiel ĉijare. M. T.*)

En ambaŭ citaĵoj montriĝas la elemento „unueco“: B. S. elkreis la modernan ĉeĥan nacian muzikon – kaj la ĉeĥa muziko elkreis sian reprezentanton, kiu ĉiam en ĝi substrekas la frapan trajton – la ĉeĥecon!

Se ni rigardas en la historion, ni konstatas, ke la plena signifo de B. S. montriĝis en la etapo por nia lando la plej malfacila: en la jaroj de la Dua mondmilito. Li fariĝis onidire „politika reprezentanto de sia popolo“. La prezentado de la opero „Libuše“ – pro siaj profetdiroj; kaj la patrioteca simfonia poemaro „Má vlast“, en la Nacia teatro, kaŭzis popolajn demonstrojn, do ili estis malpermesitaj.

Se ni volas ekscii pri la fontoj de ambaŭ fenomenoj – do pri Bedřich Smetana kaj pri ĉeĥa nacia muziko, ni citu la tekston de la aŭtoro plej elstara – Zdeněk Nejedlý. Por laŭvere pripentri la portreton de Bedřich Smetana kiel personulo kaj lian muzikon li diras: „Ŝajnas, ke en la muziko de B. S. estas parto de ĉiu nia artisto: en ĝi sonas tio, kion ni konas el Mácha, el Němcová, el Neruda... kion ni havas en Mánes, en Aleš... Lia muziko estas al ni tiom proksima, ke ĝi ŝajnas enhavi en si parton de ĉiu el ni: de ordinara homo el popolo ĝis la plej renoma fakulo, en artoj ni ĉiuj trovas en la muziko de B. S. sin mem; kaj tio nin ĝojigas.

Tiom vasta, pro siaj internaj mondoj amasplena, estas la verkaro de B. S. Li estas la plej granda en sia artosfero, la plej granda pro sia interna forto, per kiu manifestiĝas absoluta genialeco.

Ju pli en la verkon de B. S. ni profundiĝas, des pli bone ni malkovras lian individualecon, lian artan personecon. B. S. por ni jam ne plu estas la modesta, lirik-mola, „ĉeĥe malkuraĝa“ artisto, kiel eble pri li opiniis la samtempuloj de liaj junaj jaroj. Antaŭ nia interna vido elstariĝas granda personulo de mirega energio kaj pozitivaj ecoj; pli kaj pli alten, ĝis la art-fenomeno de heroeca forto. De la kreoenergio kaj kreopasio ekbruliĝinta kaj brulanta GENIO.“

Por la muzik-genieco de B. S. ne sufiĉis nur niaj malgrandaj landoj, la limoj naciecaj. Ne! Li tuj altiĝis en la sferojn de granda arto tutmonda. Nur de tiuj li povis ĉerpi por si fascinigon kaj kreaĵojn. La Patrolando – almenaŭ de artflanko-koncerne – povis doni al li nur malmulte, kio ne povis al B. S. sufiĉi; ne al lia sopiro je la arto la plej alta... Ne malgrandaj muzikistoj, sed Mozart kaj Beethoven, la romantikistoj (kiel Schumann) kaj nov-romantikistoj kiel Berlioz, la kreantoj de la moderna muziko kiel Liszt kaj Wagner, kaj apud ili tiel proksima Chopin – tiuj estis liaj kunkunuloj, en kies artosfero li elkreskis kaj vivis. Jenan grandecon kaj noblecon, kaj sian grandan varmon kaj pasian amon al la Patrolando li kumulis, kaj el tio li kreis

modernan ĉeĥan nacia muzikon.

Kio ja estas „la ĉeĥa nacia muziko“ kaj kiel li komprenis la aferon kaj sian taskon en ĝi.

1. Li estiĝis *nov-romantikisto*. Li tre aprezis la romantikistojn, (kiel jam dirite – ekz. Schumann), kies verko estas lirika, etos-plena. Sed Lin eĉ pli allogis la verkoj de Liszt, de Wagner – en kiuj estas „programo“. Do, ambaŭ elementojn li ensuĉas – kaj siajn verkojn li konstruas „programaj sur lirika bazo“... Li kreis 8 operojn kaj el ili la romantiko ĝuste „elŝprucas“... Kaj ne nur en la operoj.

La programon enhavas ĉiuj liaj verkoj – ĉu simfonioj, ĉu opusoj kameraj kaj aliaj. Ili estas proksimaj ankaŭ por laikaj aŭskultantoj. Oni „legas“ en ili kaj ilin ĝuas.

2. Ni mencias la „mondecon“, sed ni parolu, kiaj estas trajtoj de la ĉeĥa muziko...

B. S. vivis en la etapo de nacia reviviĝo, kiam montri la patriotecon estis la ĉefa postulo de ĉiu loĝanto. Kio koncernis la muzikon – oni rekte postuladis, ke ĝi estu nacia, t.e. ĉeĥa – ke en ĝi rekte sonu la naciaj, do popolaj, melodioj.

La nobla animo de B. S. tion komprenis alie – la postulon li kaptis tute novkonforme; kun alta muzik-inteligenteco. Li en ĝin enlaboris

popolan melodikon, kiun ni aŭdas en ĉiuj liaj komponaĵoj – ĉu romantikaj – ĉu lirikaj – ĉu heroikaj...

Ke en la ĉeĥaj landoj estas la plej ŝatata verko **Prodaná nevěsta**, tio estas stato konata kaj daŭripova. Ĉar ĝuste tiu ĉi komponaĵo estas „la kvintesenco“ de nacieco kaj romantismo. Sen plua eksplikado ni komprenas, kion la nocioj signifas...

Kaj kun la sama amo estas akceptata (kaj ne nur ĉe ni) la verko de karaktero liriko-heroika: la simfonia poemaro **Má vlast**...

Preskaŭ tuŝas nin (aŭ ni tuŝas) la objektoj de la Simfonio, ĉar ili troviĝas ĝuste „malantaŭ niaj dorsoj“. La vorteksplikoj helpu nin plene kapti tiujn en la muzika senco...

1. Vyšehrad

La harpoj de profetoj kaj la kanto de profeto parolas pri eventoj sur Vyšehrad – la unua sidejo de slavaj suverenoj; pri ĝia glora historio, pri turneoj, pri bataloj – ĝis la fina malkresko de la burgo kaj ĝia ruiniĝo. La komponaĵo finiĝas per elegia melodio...

2. Vltava

Kiel B. S. mem esprimiĝis: „La komponaĵo bildigas kuron de la rivero – komence el malgrandaj fontetoj (malvarma kaj varma Vltava), poste kuniĝo de ambaŭ en unu rojeto, poste fluo de Vltava tra boskoj kaj sur herbejoj, tra landregionoj, kie popolanoj ĝuste festas sian tradician eventon; ĉe nokta lumo – svarm-dancado de najadoj; sur la apudstarantaj rokoj elstariĝas fieraj burgoj, kasteloj kaj ruinoj; ĝi fluas pluen – al Prago – en ĝia vasta torento speguliĝas Vyšehrad, kaj trairante la urbon ĝi malproksimiĝas de ni, de ni... kaj elfluas en la majestan riveron Labe.

La celo de B. S. estis bildigi Vyšehrad kiel simbolon de la pasintaj epokoj kaj daŭrigon de la ĉeĥa lando en la bildo de „nemova elemento“. Dum Vltava estas „vejno“ de la lando, trairanta koron de la Patrujo, tuŝanta Vyšehrad – do ĝi estas mem la bildo de la vivo...La melodio ne estas malproksime al varmaj tonoj de popolaj kantoj.

3. Šárka

Šárka aliĝas al la antaŭaj du Poemoj same nature, kiel la prikantita loko situas reale, nature...

La samaj rokoj, kiuj fariĝis la unuaj loĝantarsidejoj slavaj, estas motivo de la evento-legendo pri la knabino Šárka, kiu pro malfideleco de sia amanto Ctirad tiom furioziĝis, ke ŝi proklamis venĝon al la tuta virgento. De malproksime aŭdiĝas alveno de Ctirad kaj de liaj armitaj kunuloj; la trupo celas puni kaj subigi knabinojn. Aŭdeblas plorĝemo (falsa) de unu knabino, kiu estas alligita je arbo. Ctirad admiras ŝian ĉarmon, amflamiĝas

kaj ŝin liberigas; pere de preparita trinkaĵo ŝi gajigas lin kaj liajn kunulojn, ĝisdorme... Je la signalo (ĉaskorno) elsvarmiĝas kaŝitaj knabinoj por fari sian sangan agon; teruro de amasa mortado, furiozeco de la venĝema Ŝárka... Fino de la komponaĵo.

Parentezo

Por la premierkoncerto de Vltava (aprilo 1857) gajnis B. S. financan sumon kaj li povis vojaĝi eksterlanden en la espero, ke tie eblas resaniĝo de lia aŭd-malkapablo. La espero estis vana – la malsano pli kaj pli malboniĝis. La familio translokiĝis en la Mladá Boleslav-regionon, nome en Jabkenice-n, kie Josef Schwarz, la bofilo de B. S., havis forstistan domon. Kvankam kuracisto tute malpermesis al B. S. okupiĝi pri intelekta agado, li malgraŭ tio tuj komencas krei la pluajn simfoniajn poemojn:

4. Z českých luhů a hájů

Ĝi estas certe lia plej ĉarma opuso...

Pri ĝi B. S. eldiras jenon: „Tio estas pentrado de sentoj, kiajn oni havas alrigarde de nia lando. El ĉiuj flankoj, el boskoj kaj herbejoj sonas kant-melodio plena je varmecoj – jen gaja – jen melankolia; arbaraj kaj rikoltdonaj regionoj – jen la lando ĉirkaŭ la rivero Labe estas prikantata... la poeto havas tute liberan imagon antaŭ si...“

5. Tábor kaj 6. Blaník

La konstruo de la Poemoj **Tábor** kaj **Blaník** sur la motivoj de la husitana himno „Kdož sú Boží bojovníci“ signifas manifestiĝon kaj aprobon de B. S. al la principo de husitanoj. La himno certe estis multofte kantita en la ĉefa sidejo de husitanoj – en la urbo Tábor.

Blaník estas daŭrigo de **Tábor**.

B. S.: „Post malvenko la herooj husitaj kaŝis sin en la monto B.

Kaj en profunda dormo ili atendas momenton por helpi al la Patrujo.“


Rim. Laŭ ĝenerale konata legendo la gvidanto de Blaník-kavaliroj estas la patrono sankta Václav. Sed ne estas sciata, ke laŭtradicie (de la 15-a jrc.) la estro estas Jan Žižka. Nur la cenzuro en la 19-a jrc. anstataŭigis lin je Václav, kiel en nun konata legendo.

Bedřich Smetana ne timis aprezi la husitanan legendon kaj kuraĝe dediĉis la verkon al La Reĝa Ĉefurbo Prago. La reprezentantoj eĉ ne dankis lin pri tiu ĉi grandioza verko.

La komponaĵo „Má vlast“ ĉiujare, je la 12-a de majo, malfermas la internacian muzikfestivalon *Pražské jaro*.

EN LA MUZIKO ESTAS LA VIVO DE ĈEĤOJ

Jan Duda



En la muziko estas la vivo de ĉeĥoj

KAVA-PECH ofertas la libron de Jan Duda *En la muziko estas la vivo de ĉeĥoj*.

La teksto estas bazita sur iama prelego de Jan Duda prezentita dum la UK en Prago en la jaro 1996. Ĝi koncize, tamen trafe resumas la evoluon de la muziko en Ĉeĥio kune kun la priskribo de la plej elstaraj ĉeĥaj komponistoj, sendepende, ĉu ili agis en Ĉeĥio aŭ eksterlande, fronte kun Smetana, Dvořák, Janáček kaj aliaj.

Kiel titolon de la libro elektis la aŭtoro

konatan citaĵon de la komponisto Bedřich Smetana.

Pražské stopy Antonína Dvořáka

U příležitosti 180. výročí narození Antonína Dvořáka Národní muzeum – České muzeum hudby připravilo poznávací hru *Pražské stopy Antonína Dvořáka*. Bližší informace naleznete na následujícím odkazu:

<https://www.nm.cz/program/akce/prazske-stopy-antonina-dvoraka-poznavaci-hra>



Niaj poetinoj centjariĝis

Margit Turková

Eva Seemannová * 1921

Eli Urbanová * 1922

Marjorie Boulton * 1924

Sed ne ĝisvivis

E. S. + 1999

E. U. + 2012

M. B. + 2017

La du ĉeĥajn poetinojn ni omaĝis en la koncertaj jaroj; en la manoj ni havas ALMANAKON, kiun jubileo al Eli Urbanová eldonis la eldonejo KAVA-PECH. Rilate la angl-devenan Marjorie Boulton – ni havas ŝian naskiĝ-jubileon antaŭ ni.

Ĉiuj prezentitaj datumoj igas nin ne nur rememori, sed eĉ kompari la poet-grandulinojn...



Eva Seemannová

Profesia teatro-artistino.

Pri poezio ŝi okupiĝis malmulte, nur laŭokaze. Tamen ŝi estis premiita internacie por la poemo „Mia konfeso“. La tutan vivon ŝi „konfesis“ pri si mem nur per teatro-formaj manieroj: ĉu en sia patrolando, ĉu en la Esperantujo internacia. La poezion ŝi abunde disvastigadis pere de deklamado.

Pri siaj privataj, eĉ intimaj, aferoj ŝi neniam esprimiĝis publike. Pasieme ŝi „brulis“ nur pere de siaj teatro-heroinoj.

Deca en sia kutima vivo – pasiema en sia arta vivo...

Svelta, eleganta virino, kritikema al si mem kaj al aliaj...

Pri sia okupado tre fiera, al sia aŭskultantaro ekstreme sindonema...

Eli Urbanová

Instruistino, edukistino. E-akademiano.

„... estas mi seks-bomb'...“ elŝprucas el unu ŝia poemo...

Kaj nedube – el ĉiuj fotografiaĵoj, kiuj estas haveblaj, videblas la virino, al kiu tia epiteto „sidas“. De ŝia junaĝo ĝis la lastaj vivjaroj ni vidas allogan belulinon, por kiu la AMO en ĉiuj formoj estis la vivsuko. Pri ĝi ŝi pripensadis, meditadis, publikigadis. Kaj ĝin ĝuis. Tiu temo estas la trajto

karakteriza koncerne la personecon kaj same la kreadon de la aŭtorino. Se oni volus (laŭke) envicigi ŝian poemaron en ian kategorion, do „ktg. Erotika“. Sur la amaseto da poezi-volumetoj sidas la famkonata romano „Hetajro dancas“. Unusola skribita en prozo – kaj la plej erotika. Post kiam la libro tralegiĝis, elstaris la demando: „ĉu tiom da intimaĵoj la Esperantujo eltenos...“

Parafraze ni starigu la saman demandon, se ni vidigos la poemon *Abismo de ekkono*.



Mi diros tion simple, ĉar simple ĝi okazis.

*Sentante malantaŭe
momentan tiklon strangan,
mi volis scii veron...*

*Mi tuj, tuj ĉion lasis,
kaptis murspeguleton,
jes, eĉ lupeon grandan...*

*Kiam mi min esploris,
mi iel senintence
alŝovis ambaŭ aĵojn
pli supren al la sino...*

*Terura nun abismo
Ekfaŭkis min potence.*

*Do tie mi promenas,
Do tie, en vagino!*

Ĉu tion eltenos nia legantaro?!

Marjorie Boulton



El la biografio ni eksciu, ke ŝi studis en la Oksford-universitato, kaj poste Ŝi estiĝis profesoro (en la sama kolegio), kie ŝi instruis la anglan lingvon kaj literaturon. Kiel siajn instruistojn ŝi rememoras la famajn verkistojn C. S. Lewis kaj JRR Tolkien. Multajn pensojn ŝi redediĉis ankaŭ al siaj studentinoj, pro kiuj ŝi montris empatian kaj sian poezi-spritecon.

Jen plej trafe ŝi karakterizas sin mem:

La triopa MEMO

*Mi estas tri. La digna lektorino
kun la krajon' kritika libron legas.
En nigra robo, pri la origino
de l'dramo primitiva ŝi prelegas.*

*Dume, en koro, primitiva dramo
okazas; ĉiam freŝa kaj terura;
sub nigra robo brulas nun pro amo
virino simpla en dezir' tortura.*

*La lektorino pensas. La virino
baraktas, krias, nur angoron sentas.
Sed la poet' per arta disciplino
observas ilin ambaŭ – kaj komentas.*

Koncerne Esperanton:

La Lingvon Ŝi eklernis en la jaro 1949 (en 1957 Ŝi fariĝis akademianino)
kaj jam Ŝi videbliĝis per jenaj verkoj:

- La biografio pri LLZ
- La Lingvo-sciencaj eseoj
- Anatomio de l'poezio (1953)
- Anatomio de l'prozo (1954)
- Anatomio de l'dramo (1960)
- Anatomio de l'lingvo (1968)

Kaj ekstartis sian talenton de poezia verkado (en la angla kaj en Esperanto)

Okaze de Ŝia jubileo eldonis la Esperanto-asocio de Britio duvoluman kolekton de poezia verkaro (kun redaktaldonoj entute 1212 pĝj) – UNU ANIMO HOMA.

Malgraŭ la „griza“ profesoraspekto oni ĝuas la spiritan kaj intelektan riĉecon, kiu kuŝis en tiu homementulino – kaj kiujn Ŝi kapablis transpreni al siaj legantoj...

Jam dekomence videblas, kiel forte Ŝi sentas la esperantistan kolektivon ĉirkaŭ si; precipe virkolegojn; ties amikecon, subtenon, estimindan verkotalenton kaj organizkapablon.

Ni ekkonas kelkajn, kiuj estas de Ŝi adorataj (Juan Régulo Perez, Ivo Lapenna, Gaston Waringhien – nur ekzemple). Ĉiu esperantistaro scias, ke inter la viroj, kiujn Ŝi plej „elstarigis“ estas Willam Auld. Sian rilaton ili publikigis en la volumeto, kiun oni konas sub la titolo „Rimleteroĵ“... Jam Ŝia komenca alnomigo – „Vilĉjo“ diras multon (certe ne ĉion)...

La volumeto (sur korespondkartoj) enhavas 84 rondelojn, en kiuj montriĝas spriteco, per kiu ambaŭ gepoetoj estis talentitaj...

Eble ĉiu poeto kreas en sia vivo unu verkon, kiu estas „pinta“; (ĉe W. Auld tio estas la „Infana raso“) . La korespondado komenciĝas je propono de W.A. kaj per la vortoj: „*Epos' Nuntempa – Grandiozo!*“...do, kio nin instigu pli ol tiuj vortoj legi la eposon (se ni volas plene estimigi la homan koncernon de la poetino)... Ĉar la menciita verko jam sufiĉe kaj kortuŝplene pezigos la animon de la supozata legonto, ni revenu al la „Rimletoj“ por ekkoni gepoetojn, kiuj „apartenas al si“ (laŭ nia opinio). En ili (kvankam en humor-etoso) pentriĝas la trajtoj de ili ambaŭ en la formo, kiun nenia „biografisto“ estus kapabla bildigi... Por la apudstaranta leganto, W.A. montriĝas kiel *pesimisto*, M.B. kiel *klara, optimisma animo* (en kiu troviĝas multe da travivita doloro), kiu strebas serenigi la sentojn de sia partnero... Kaj la reciproka korespondado estas kiel „ponto“ de la „duelistoj“.

De A. al B.:

*Mi vin invitas korespondi
Rondele: ĉu l'propono logas?
Ĝis nun mi tede monologas,
Sed volas jam dueton fondi.*

De B. al A.:

*Duelinviton mi akceptas,
Eĉ sub rondela disciplino,
Kvankam vi estas versmaŝino,
Kaj multe pli ol mi adeptas.
Vian inviton mi akceptas.
Vi min stimulas. Kiel vino.
Duelinviton mi akceptas,
Eĉ sub rondela disciplino.
Mi min en lukto ne esceptas
Kaj mi duelos kun obstino.
Hej, skoto, kion vi konceptas
Kiam vi sendas al anglino
Duelinviton? Mi akceptas!*

*Marjorie – energio nerva,
mikso de timo kaj aplombo,
Eksplovas kiel atombombo
aŭ tremas pro fuĝemo cerva
Laŭ romantiko sin observa
Poemas apud amotombo
ŝajne sen paŭz' kaj interrompo*

*Jen Vilĉjo Auld, talent' masiva,
La emociojn li kontrolas'
Laŭ teorio Vilĉjo volas
Esti kritika, objektiva
Sed filozofa pozitiva,
Li ankaŭ helpas kaj konsolas,
Vortludas, spritas kaj petolas,
Ama, amika, varma, viva*

*Virino, vi min embarasas
Per varma tono, lang' instiga...*

*Prave vi nomas min virin',
Tro mola estas mia sin',
Mi amikiĝas tro intime
Kaj mi min donas tro senlime*

*La emociojn mi malfidas
Ili tro ofte nin perfidas
... mi kredas...
Ke rezonado kaj logiko
Nin al la fina celo gvidas
Instinktojn mi racie bridas*

*Vi nobla bardo, frato mia...
La lernantin' de vi, genia...
Mi venos kun la am' konkorda...
Kuraĝon, Vilĉjo...!*

Per tiu ĉi tenera metaforo pintiĝis (por mi/nescia) la „kampo de Amo kaj erotiko ĉe M.B. Ĝis mi atingis la serion da poeziaĵoj „La sekreta psiko“ ... „Kamasutro“ !... Nun mi tute alie rigardas en la okulojn de la poetino, kies portreto troviĝas sur la kovrilo de ambaŭ volumegoj. Sub multaj aludoj ni rememoru la grandulinon per instigo, kiun Ŝi destinis al ni:

*Per arto, amo kaj sincero
Laboru ni, semi-gefiloj,
Tra la doloroj, malfaciloj,
Pli en kompato ol kolero*

Por ke ni vivu en Espero!

Mortis Karla Erbová (rememoro al mia amikino)

Margit Turková



Je la 19-a de marto mortis en Prago la ĉeĥa poetino kaj verkistino **Karla Erbová**. Ŝi ĝisvivis 90.

Ŝiaj poemoj estis tradukitaj en: la germanan, polan, luzacio-soraban, francan, bulgaran, italan –kaj ESPERANTON... Mi ĝojas, ke estas menciita nia Lingvo, kaj ĝuste pri tio meritas mi mem; danke al niaj amik-rilatoj, kiuj ricevis la liter-formon: danke

al **Jaroslav Krolupper** troviĝas en Esperanto unu ŝia poezia volumeto... Do, nia intereso pri ŝia verko kaj ties prilaboro ne estis vana kaj atestas pri nia publika agado...

De la jaro 1966, unue, (tiam sub la nomo Karla Papežová) ĝis nun, ŝi verkis pli ol 30 poezio-volumojn kaj publikigis multajn tekstojn en diversaj literaturaj kompilaĵoj, almanakoj k.s.

Tre vigle ŝi laboris por organizi kaj prezenti la ĉeĥan literaturan sferon. Je multaj lokoj ŝi estis videbla (do ofta celo por kontraŭuloj). Tamen nun – kiam jam ĉio (kaj bona kaj malbona) estas for – oni decas – oni devas listigi tiujn lokojn, la funkciojn, en kiuj Karla agis:

(transprenite el interreto, de Jaroslav Špulák).

Ŝi naskiĝis en Plzeň, do ankaŭ en ĉi loko ŝi plej famiĝis...

1. Ŝi estis fond-persono de la literatura grupo „JUNIO 63“ en Plzeň
2. 1995-1997 ŝi estis prezidantino de la instituto: „Asocio de la Nacia biblioteko de la Ĉeĥa respubliko“
3. Ŝi estis membro de la „Internacia PEN-klubo – la ĉeĥa centro“
4. –II– de „Umělecká beseda“
5. –II– de la „Centro de verkistoj en la okcident-bohemia regiono“
6. En la j. 1995, en Plzeň, ŝi fariĝis honora posedanto de la urba premio, en la 1999 la sama: „Premio de Jan Zahradníček“. La urbo Plzeň estas al ŝi dankema pro regula organizado de la „Bohumil-Polan-festivalo“, honore al la regiona poeto B. P., en kiu ŝi kelkfoje ricevis la unuan premion
7. Ŝi estis kunlaborantino de la elsendejo Československý (poste Český) rozhlas; de la elsendejo „Svobodná Evropa“ (tute nature, ke post la j. 1968 ŝi estis „malpermesita“...)
8. Pasintjare ŝi ricevis la „Honoran premion **Artis Bohemiae Amicis** pro disvastigado de la ĉeĥa kulturo en nia lando, kaj eksterlande.

Kiel mi nun bedaŭras, ke tiu evento iris ekster mi, do mi ne povis al ŝi gratuli... „Mian kulpon“ mi eliminis almenaŭ interne, se mi reĝuos la verkojn, kiujn ŝi al mi donacis...

Denove legi – kaj rememori...

Kavaliroj el Blaník

Alois Jirásek

Aŭdu la lastan malnovan miton kaj profetaĵon, kiun diris la blinda junulo al reĝo Karolo benmemora.

Jen, Blaník en robo de malhela arbaro, kiu ĝin kovras desupre sur ĉiuj flankoj. Serioze, eĉ morne ĝi observas la regionon situantan fore de la mondo, ĝiajn montetojn kaj plataĵojn malmulte fekundajn. De malproksime videblas ĝia supro kaj en la ĉirkaŭaĵo ofte explore oni rigardas ĝin. De nuboj vualita ĝi profetas malbonan veteron, se ĝi hele bluetas, ĝi promesas certan kaj serenon tempon.

Sur la supro de Blaník oni vidas en ombro de fagoj, abioj kaj piceoj praajn ŝtonajn muregojn plejparte en ruinoj. Ili kovriĝas de musko kaj arbustaro; nek spuro nuntempe pri la ligna burgo, kiun ili ŝirmis.

Sed sub la muregoj, en la monto mem dormetas armitaj kavaliroj, „sanktvenceslaa armeo”, dormetas kaj atendas, kiam venos la tago, kiam necesos ilia helpo, kiam ili estos alvokitaj al batalo.

Sub roka supro de Blaník, en la orienta deklivo estas roko en formo de ogivo. Tie estas enirejo en la monton, tie ankaŭ ŝprucas fonto. El ĝi trinkigas la kavaliroj el Blaník siajn ĉevalojn, kiam foje dum la lunbrilo ili elrajdas el la monto sur herbejon inter arbaroj sub la monto. Dum tia nokto sonas en la ĉirkaŭaĵon obtuza sonegado, tamburbruego kaj sono de klariono. Antaŭ mateniĝo subite ĉio eksilentas, la kavaliroj, ĉevaloj, ĉio ĉesas en la roka pordego kaj malaperas en la mistera sino de la monto. Sole sur la herbejo restas memoraĵo post la nokta kavalkado: multegaj spuroj de ĉevalhufoj.

Sed en la rokokelojn, kie dormetas la sanktvenceslaa armeo, eniris jam ne unu homo.

Foje ia knabino falĉis herbon sub Blaník. Subite staris antaŭ ŝi kavaliro kaj invitis ŝin, ke ŝi iru kun li fari ordon en la monto. La knabino ne timis kaj iris. La pordego en la monton estis malfermita. Ŝi ekvidis volbajn rokhalojn, potencajn kolonojn kaj sur ili dismetitajn armilojn. Profunda silento kiel en preĝejo estis en ĉiuj haloj, en mistera flaveta duonlumo. Apud muroj ĉe manĝuloj staris vice selitaj ĉevaloj, ĉe la ŝtonaj tabloj en la halo sidis la kavaliroj, klinitaj vizaĝe al la tablo. Ili dormis, kaj la ĉevaloj senmove staris; kapon ili ne movis, ne frapis per hufoj, nek per vosto svingis.

La knabino eniris, ĉirkaŭrigardis, sed neniu sin movis. Ŝi komencis do balai. La laboro rapide pasis kaj post tempeto ĉion ŝi ordigis. Ankaŭ nun neniu ŝin haltigis, neniu alparolis ŝin, neniu vekigis.

Kiel ŝi envenis, tiel eliris, kaj kiam ŝi venis hejmen, oni demandis ŝin, kie tiel longe ŝi estis.

Ŝi miris kaj diris, ke ŝi venas kiel ĉiam en la sama momento. Ŝi miregis, kiam oni diris al ŝi, ke lastfoje en la sama momento antaŭ unu jaro, el la herbofalĉado ŝi venis, ke la tutan jaron ŝi estis for. Kaj ŝi rakontis, kie ŝi troviĝis, kaj tiam ĉiuj komprenis, kial la jaro estis momento por ŝi. Sed la trian tagon la knabino mortis.

Same kiel ŝin, invitis nekonata kavaliro ankaŭ forĝiston el Louňovice en la monton, por ke li hufoferu lian ĉevalon. La forĝisto iris, kaj kiam li finis la hufoferadon, oni donis al li balaĉjon en la sakon, kiun li pro kolero elŝutis antaŭ la monto. Hejme li sciigis, ke jam oni priploris lin, ĉar senspure li malaperis kaj dum la tuta jaro estis nenia signo pri li.

Kaj li rakontis, kio okazis kun li, kaj kiam poste li skuĉetis la sakon, elfalis el ĝi tri dukatoj. Nun li vidis, ke li eraris. Tuj li kuris al la pordego de Blaník, kie li elŝutis la balaĉjon. Sed vane. Estis tie nek balaĉjo, nek dukatoj.

Ankaŭ oni rakontas pri paŝtisto, kiu serĉis perditan ŝafon kaj mem erarvojis al Blaník, ankaŭ pri junulo, kiu same longe, nome unu jaron, kiel tiu paŝtisto restis en la monto, eĉ ne ideon havante pri tio.



Sed tio okazis antaŭ longege – Blaník fermita, serioze ĝis morne observas izolan, de la mondo foran regionon, kaj kvazaŭ melankolio de trista revado kuŝus sur ĝi kaj ĉirkaŭe. La sanktvenceslaa armeo ankoraŭ dormas. Ankoraŭ ne venis tempo, por ke ĝi leviĝu. Tio okazos en tempo de la plej granda danĝero, kiam sur nian patrimon ŝutiĝos tiom da malamikoj, ke la tutan reĝolandon ili disportus per hufoj de siaj ĉevaloj.

Tiam oni vidos strangajn signojn: sekiĝos arbosuproj en la arbaro de Blaník, sur supro de la monto verdiĝos maljuna sekiĝinta kverko kaj fonto ĉe la roko tiel superakviĝos, ke ĝi torente fluegos malsupren. Tiam okazos granda, sanga batalo en la regiono inter Blaník kaj Naĉeradec. Fiŝlago Dezerta, apud kiu la maljuna sekiĝinta arbo verdiĝos antaŭ la batalo, pleniĝos de verŝitaj sangofluoj. Kaj estos plorado kaj granda aflikto pro la malespera batalo, sed ĉeĥoj heroe defendos sin kontraŭ la pli forta malamiko. En la decida momento Blaník apertiĝos, la kavaliroj plenarmitaj elrajdos el la monto kaj sankta Venceslao, rajdante sur blanka ĉevalo kondukos ilin por helpi al ĉeĥoj.

La malamiko, pro subita timo ĉirkaŭita kaj kvazaŭ sensobtuza, fuĝos al Prago kaj tie poste la terura batalo estos finita. Kaj ĝi estos tiel furioza, ke la sango fluegos de Strahov ĝis la ŝtona Karol-ponto. Tiam la sankta Venceslao sur la blanka ĉevalo kun la standardo en la mano kondukos ĉeĥojn kaj la fremdulojn kaj ĉiujn malamikojn de la ĉeĥa reĝolando elpelos el la lando. Kaj sankta Prokopio, abato el Sázava kun lambastono, helpos al li.

Poste venos sankta kvieto kaj la ĉeĥa lando ripozos. Multaj ĉeĥoj pereos dum la bataloj, sed la restintaj estos veraj viroj. Ekkoninte erarojn de siaj antaŭuloj kaj ankaŭ siajn, ili konkorde staros kaj malamiko ne terenfaligos ilin. –

Jen la mitoj el la praaj tempoj kaj malnovaj profetaĵoj pri nia lando.

Feliĉa estu, ho, kara patrio, fortiĝu via generacio, ĝi venku ĉiajn suferojn, ĝi konservu la sanktan heredaĵon: la gepatran lingvon kaj la malnovan, bonan sian rajton.

Potenciĝu via generacio per laboro kaj entuziasmo, por ke ĝi estu firma kiel rokoj kaj ĉiam plena de forto.

Tradukis Josef Vondroušek

Homo kaj besto

La sekvantan poemon ni publikigas kiel kuriozaĵon konekse al la februaraj prelegoj de Margit Turková pri la spiritismo. Laŭ spiritistoj nome tiu ĉi poemo estis diktita al mediumo de L. L. Zamenhof en la jaro 1961.

Se hom' vi estas, jam sur alta monto,
Kondutu home do, laŭ homa deco;
River' ne fluas reen al la fonto,
La homo ne revenas al besteco.

Se agas brue apro, tigro, lupo,
Ĝi venas de naturo sen prudento;
Sed homo staras sur pli alta ŝtupo,
Kaj ne pereu pro malnobla sento.

Ve! nekredeble estas, ke „kulturo”
Armilojn forĝas por detru' kaj timo!
Anstataŭ ke tuj disbastiĝus muro,
En ombro da terur' tremas animo.

Ho! Mi ne scias, ĉu al bestoj mem
Ne fiodus tia „civilizo”...
Por kio do la Lum' el Bet-Leĥem
Kun „Amo reciproka” por devizo?

Fiero – sed pri kio? Pri grandeco
De lando, pri supera raso – kio!
Pri tia devus honti homa speco,
Per ĝi la homo falas ĝis nenio!

Supera estas Unu sola, fratoj,
Sed donas manon sen disting' de io;
Li estas Reĝo, sed sen preferatoj,
Li ĉiujn amas, ĉar Li estas – Dio!

La tekston preparis Margit Turková

**KURZ
ESPERANTA**
s Tomášem Břicháčkem

Esperanto
od A do Z

20 lekcí na YouTube
pro začátečníky

Na YouTube postupně vzniká internetový kurz esperanta, který vede Tomáš Břicháček. Kurz je určen pro začátečníky a bude mít 20 lekcí. Kurz je dostupný na následujícím odkazu:

<https://www.youtube.com/watch?v=NTvfmzjvQT8&list=PLFujbvHs7fwix4AxFfgOqPfelc3C-yIvh>.

Termíny schůzek od září:

12. 9. / 26. 9. // 10. 10. / 24. 10. // 7. 11. / 21. 11. // 5. 12. / 19. 12.

Poznámka redaktora:

Zvláštní poděkování za pomoc při přípravě tohoto čísla našeho časopisu patří paní Margit Turkové, která dodala velké množství kvalitních textů.

Klub esperantistů v Praze,

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7 – Holešovice, PSČ 170 00
Web: <http://bulteno.cs-retromusic.net>
E-mail: paha@esperanto.cz
Facebook: <https://www.facebook.com/esperantoprago>
YouTube: Esperanto Prago
Schůzky: Ve Smečkách 25, Praha 1 – Nové Město, PSČ 110 00